EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ileI IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 12>** ● Olimpiko ● Pola Kongreso ● DK ● Afrika Kulturo ● **< feb. 23**

# Salutoj por la vintraj olimpikoj

Antaŭnelonge ĉinaj amaskomunikiloj invitis honorajn gastojn tra la mondo por saluti la Vintrajn Olimpikojn, Ĉina Esperanto-Ligo invitis prezidanton Charters nome de Universala Esperanto-Asocio prepari videan salutmesaĝon al la Vintraj Olimpikoj, la filmetoj estas en diversaj lingvoj kaj aperis en diversaj lingvaj platformoj, ĝis hodiaŭ la filmo ricevis milionojn da vidoj kaj ŝatojn, jen:

Retejo Ĉinio: http://esperanto.china.org.cn/2022-02/08/content_78035368.htm

Portalo *El Popola Ĉinio*

http://espero.chinareports.org.cn/2022-02/08/content_78035372.htm

En Wechat-konto de *El Popola Ĉinio* :

https://mp.weixin.qq.com/s/KlCMa36BBE5Bo8VL2_7Nhg

Esperanta fejsbuko :

https://www.facebook.com/1753507848248309/videos/416866630232910/

Ĉinlingva platformo:

https://article.xuexi.cn/articles/index.html?art_id=6537701959806723525&t=1643860984329&showmenu=false&study_style_id=video_default&source=share&share_to=wx_single&item_id=6537701959806723525&ref_read_id=042e1cfb-12eb-4988-9066-ab86602c9a15_1643866836769

http://www.chinareports.org.cn/yszx/duoyu/20220202/26203.html

Anglalingva fejsbuko:

https://www.facebook.com/ChinaReportASEAN/videos/456483252867725

Japanlingva fejsbuko：https://fb.watch/aX7rbWzdFE/

Japanlingva *Twitter*：https://twitter.com/PeopleChina/status/1489082548521029632

Korealingva fejsbuko：https://fb.watch/aVKaxcavvo/

# Plia mikronovelo el la Belartaj Konkursoj

Miguel Fernández legas la mikronovelon "Verŝajne" de Christian Rivière.
Tiu mikronovelo ricevis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2019.
https://youtu.be/-66f4OUS7mY mga

# Pola kongreso fine de junio

La Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio kore invitas al la 39-a Pola Esperanto-Kongreso. Post paŭzo en la jaro 2020 kaj komuna Virtuala Pola-Germana Esperanto-Kongreso, la sekva kongreso okazos en Łódź, kie PEK okazis jam multfoje dum la jardekoj. Alkroĉita estas la informriĉa Unua Bulteno.

# Kalendaroj en la 52a Dimanĉa Kunveno (DK)

La 6an de februaro okazis la 52a DK de IKEF (nia komerca faka asocio) kun 105 partoprenantoj el Brazilo, Ĉinio, Irano, Kanado, Koreio, Mongolio kaj Turkio. La kunveno okazis tuj post la Orient-Azia Novjara festo, tial la kursanoj de IKEF salutis la partoprenantojn per siaj prezentoj t.e. kantoj, deklamoj ktp.

Post tiu ĉi programero s-ro Enkhee (IKEF-Mongolio) prezentis pri la mongola tradicia kalendaro. Jen kelkaj diraĵoj el la enhavo de lia prelego: dum la Huna Imperio (hunoj - prapatroj de mongoloj, 5-a jarcento AK – 2-a jarcento PK) oni lanĉis la kalendaron kun jartitoloj de 12 bestoj, la kalendaro estas reviziita multfoje dum la longa historio, ekde la jaro 1027 oni kalkulas la Jarsesdekojn, alivorte la 12 jaroj formas unu fazon kaj la 5 fazoj formas unu Jarsesdekon, en 2022 okazas la Tigro-jaro, la 36-a jaro de la 17-a Jarsesdeko, krom jaroj, ankaŭ monatoj, tagoj kaj horoj titoliĝas je tiuj 12 bestoj, la kalendaro ne estas absolute luna sed ĝi estas lunsuna, la mongola novjarfesto nomiĝas *Cagaan Sar* kun signifo 'la Blanka Monato' aŭ 'la Blanka Luno', oni celebras ĝin en la familia medio, en la religia komunumo kaj en la ŝtata protokolo, kaj ankaŭ mongolaj respublikoj en la Rusa Federacio celebras la mongolan novjaron. Fine de sia prelego li prezentis iom pri ekonomiaj aspektoj pro la celebrado, ekzemple pri elspezoj de ordinaraj mongolaj familioj. La produkta kaj komerca kampo sufiĉe multe profitas dank' al la festoj.

Sekve s-ro Surush (IKEF-Irano) prezentis pri la irana kalendaro kaj la tradicia novjarfesto. Li klarigis ke la irana novjaro okazas la 21an de marto kaj la astrologoj tre precize kaj zorge difinas la komencon de la novjaroj.

Pliaj dimanĉaj kunvenoj okazas ĉiusemajne, ĉiu ajn bonvenas!

https://www.ikef.info/forum/dk-dimanca-kunveno



# Afrika kulturo – mesaĝas la Afrika Komisiono

En la ĵus pasinta jaro okazis fruktodonaj interŝanĝoj kaj pozitivaj kontribuoj pri afrikaj kulturaj fonoj per Esperanto, kaj la Afrika Komisiono de UEA deziras ankoraŭ daŭrigi en tiu senco; ĝi aparte alvokas afrikajn esperantistojn por prelegi pri konkretaj afrikaj lokaj temoj. La prelego-proponoj devas nepre rilati al ĝeneralaj lokaj temoj kiel: *lokaj lingvoj*, *kulturaĵoj*, *manĝaĵoj*, *historioj, artaĵoj, geografio, defioj, politiko, sociaj movadoj* k.s. Sed bonvenas kaj

ankaŭ akcepteblas proponoj pri sciencaj kaj nesciencaj disciplinoj kiel *filozofio, psikologio, matematiko, arkitekturo, filologio,* ekzemple.

Se vi interesiĝas kaj volas partopreni en tiu ĉi agado, vi devas sendi simplan retmesaĝon al *afriko@esperanto-afriko.org* ĝis la 31-a de marto 2022. Tiu retpoŝtaĵo konsistu el proksimume 200-vorto resuma priskribo de la elektita(j) prelegotemo(j) kaj indiko pri viaj kompletaj nomoj kaj kontaktinformoj. La kriterioj por akceptado baziĝos sur la trafeco de la elektita(j) temo(j) kaj de la lingvo-kono de la kandidato. Unu el la akcepto-kriterioj estos la kapablo de kandidatoj flue paroli Esperanton. La minimuma akceptata lingvonivelo estas elementa nivelo laŭ la movadaj ekzamenoj de ILEI/UEA aŭ B2 laŭ la KER-ekzameno. Oni rajtas proponi pli ol unu temon pri kiuj oni havas fakajn aŭ sufiĉajn konojn. Peto pri enskribiĝo nepre devas veni almenaŭ antaŭ la ĉi-supra limdato. Pliaj informoj riceveblas ĉe: *afriko@esperanto-afriko.org*.

Afrika Komisiono de UEA, Adjévi Adjé

# Ĉeboksaro ĉe kursaro

Mi estas Aleksandr Blinov kaj mi loĝas en la urbo Ĉeboksaro (Ŝupaŝkaro) kiu estas ĉefurbo de la Ĉuvaŝa Respubliko (Rusio). Mi prizorgas privatan lingvan lernejon kaj tie instruas la italan, la francan, la ĉuvaŝan kaj foje Esperanton.Aldone oni min invitas prelegi en la loka Pedagogia Universitato en la fakultato de fremdaj lingvoj. Tie mi de tempo al tempo proponas senpagajn kursojn de Esperanto por la studentoj de la fakultato. En tiu ĉi lernojaro mi invitis ankaŭ studentojn de alia Universitato (t.n. Ĝenerala Universitato) kaj aliĝis pli ol 30 personoj. Ni faris lecionojn kaj ĉeestajn kaj distancajn (per *ZOOM*). La kurseton finis 9 personoj.

Fine de januaro mi ekhavis ideon lanĉi senpagan 10-lecionan kurson pere de *Zoom* por ĉiuj universitatoj de Rusio (por la fakultatoj de fremdaj lingvoj). La universitato helpis min pri tio. La kurso devas starti la 1-an de marto. La informo flugis la 4-an de februaro kaj por tiu ĉi horo; jam aliĝis 36 personoj el diversaj universitatoj de la lando. Por kungvidi la kurson mi petis miajn amikojn: Daria Zelenina, Andrej Grigorjevskij, Vjaĉeslav Ivanov (ili ĉiuj estas bonaj instruistoj kaj parolas plurajn lingvojn). Krom tio mi petis diskonigi la informon tra Studentaj komitatoj de la Universitato por ke la informo eventuale atingu aliajn fakultatojn (ĉefe filologiajn).

Do mi petas kaj proponas kunlaboron al ĉiu kiu ŝatus kunlabori.

1. Por miaj *ZOOM*-kursoj mi invitas gastojn (kiuj prefere estu alilandanoj kaj devas en la baza nivelo paroli kun la studentoj)
2. Mi ŝatus havi volontulojn kiuj povus veni al mia somera aranĝo (invitilon por Rusio mi faras de mia lernejo kaj pretas kovri restadkostojn) kondiĉe ke la homo instruu kaj aktive partoprenu en la programo)
3. Mi estas preta inviti volontulon kiu instruu Esperanton kaj laŭeble faru klubojn ks de la fremdaj lingvoj (angla, franca, germana, ĉina, korea, japana... ) por 3-monata restado en mia urbo (mi provizos loĝejon kaj poŝmonon kaj certe faros la inviton)
4. Por plivalidigi la retan kurson estus bone havi iujn atestilojn pri la 10-hora retkurso de iu internacia instanco kaj se UEA aŭ ILEI aŭ eĉ TEJO povus havigi al mi tiajn atestilojn mi estus vere dankema!

Aleksandr Blinov, al.blinov@gmail.com

## Prelegproponoj bonvenaj por budapeŝta konferenco

Mi invitas vin sendi prelegan proponon al la simpozio pri »Reguloj kaj instigoj en lingvopolitiko kaj planado: Ekonomiaj, juraj kaj socilingvistikaj aliroj« la 16-an kaj 17-an de junio en Budapeŝto, vidu la aldonan alvokon.

https://www.andrassyuni.eu/veranstaltungen/rules-and-incentives-in-language-policy-and-planning-economic-legal-and-sociolinguistic-approaches.html

Ni ĝojas anonci, ke du tre interesaj ĉefprelegantoj por la simpozio akceptis nian inviton: Profesorino Ainoa Aparicio Fenoll, Universitato de Torino kaj Collegio Carlo Alberto, kaj Profesoro Fernand de Varennes, la Speciala Raportisto de Unuiĝintaj Nacioj pri Minoritataj Temoj.

Ni bonvenigus vian sendon de artikolo kaj ĝojus se vi povus ankaŭ distribui la alvokon por artikoloj inter viaj kontaktoj.

Ni antaŭĝojas vidi multajn el vi en Budapeŝto en junio.

*La programa komitato*

*Bengt-Arne Wickström, Michele Gazzola, Noémi Nagy, Anneliese Rieger, Balázs Vizi.*

*Kontakto: Michele Gazzola, Ulster University, www.michelegazzola.com*

## Libro pri nia Afrika Movado elŝutebla

*Afero de Espero* estas konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko, verkita de Heidi Goes. La libro estas senpage elŝutebla:

https://www.esperanto-afriko.org/2022/02/14/afero-de-espero-heidi-goes

per muspremo al 'Afero de Espero'.

========= vortoj: 1205 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.